

**JESUO VENIS KAJ PRENIS LA PANON KAJ DONIS AL ILI, KAJ TIEL SAME LA FIŜON – Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM**

*Joh. 21, 1-19*

En tiu tempo Jesuo denove sin montris al la disĉiploj apud la maro de Tiberias; kaj li montris sin jene. Estis kune Simon Petro, kaj Tomaso, nomata Didimo, kaj Natanael el Kana Galilea, kaj la filoj de Zebedeo, kaj aliaj du el liaj disĉiploj. Simon Petro diris al ili: Mi iras, por fiŝkapti. Ili diris al li: Ni ankaŭ iras kun vi. Ili do eliris, kaj iris sur la ŝipon; kaj tiun nokton ili nenion kaptis.

Sed ĉe la tagiĝo Jesuo staris sur la marbordo; tamen la disĉiploj ne sciis, ke ĝi estas Jesuo. Tiam Jesuo diris al ili: Infanoj, ĉu vi havas ian manĝaĵon? Ili respondis al li: Ne. Kaj li diris al ili: Ĵetu la reton ĉe la dekstra flanko de la ŝipo, kaj vi trovos. Ili do ĝin elĵetis; kaj pro la multeco de la fiŝoj ili ne plu povis ĝin treni. Tiu disĉiplo, kiun Jesuo amis, diris al Petro: Ĝi estas la Sinjoro. Kiam do Simon Petro aŭdis, ke ĝi estas la Sinjoro, li alzonis al si sian kitelon ĉar li estis nuda kaj ĵetis sin en la maron. Sed la aliaj disĉiploj venis en la ŝipeto ĉar ili estis ne malproksime de la tero, sed nur ĉirkaŭ cent metrojn, trenante la reton plenan de fiŝoj.

Kaj kiam ili eliris sur la teron, ili vidis fajron karban aranĝitan tie, kaj fiŝon kuŝantan sur ĝi, kaj panon. Jesuo diris al ili: Alportu el la fiŝoj, kiujn vi ĵus kaptis. Simon Petro iris sur la ŝipon, kaj tiris la reton al la tero, plenan de grandaj fiŝoj, cent kvindek tri; kaj kvankam estis tiel multaj, tamen la reto ne disŝiriĝis. Jesuo diris al ili: Venu, matenmanĝu. Kaj neniu el la disĉiploj kuraĝis lin demandi: Kiu vi estas? sciante, ke li estas la Sinjoro. Jesuo venis kaj prenis la panon kaj donis al ili, kaj tiel same la fiŝon. Tiu estas jam la tria fojo, kiam aperis Jesuo al siaj disĉiploj, post sia releviĝo el la mortintoj.

Post la matenmanĝo Jesuo diris al Simon Petro: Simon, filo de Jona, ĉu vi amas min pli, ol tiuj? Li diris al li: Jes, Sinjoro; vi scias, ke mi vin amas. Li diris al li: Paŝtu miajn ŝafidojn. Li diris al li ankoraŭ la duan fojon: Simon, filo de Jona, ĉu vi min amas? Li diris al li: Jes, Sinjoro; vi scias, ke mi vin amas. Li diris al li: Zorgu pri miaj ŝafoj. Li diris al li la trian fojon: Simon, filo de Jona, ĉu vi min amas? Petro ĉagreniĝis, ke li diris al li la trian fojon: Ĉu vi min amas? kaj respondis al li: Sinjoro, vi scias ĉion; vi scias, ke mi vin amas. Jesuo diris al li: Paŝtu miajn ŝafojn. Vere, vere, mi diras al vi: Kiam vi estis juna, vi zonis vin, kaj iris, kien vi volis; sed kiam vi maljuniĝos, vi etendos viajn manojn, kaj alia vin zonos, kaj portos vin, kien vi ne volos. Tion li diris, montrante per aludo, per kia morto li gloros Dion. Kaj dirinte tion, li diris al li: Sekvu min.

La lastan fojon kiam Jesuo sin montras al siaj disĉiploj tio okazas apud la maro de Tiberias; en la Evangelio laŭ Sankta Johano temas pri la tria fojo dum kiu la evangeliisto metas la agadon de Jesuo en tiu ĉi loko. Kial? La du antaŭaj fojoj rilatis la epizodon de la pano kaj de la fiŝoj kiu bildigas la eŭkariston.

Nu, ankaŭ ĉifoje la kunteksto estas tiu de la eŭkaristio. La evangeliisto prezentas sep disĉiplojn, la nombro sep indikas la tutecon, do estas kiel se Jesuo sin montrus al sia tuta komunumo. Jesuo sin montras al disĉiploj kiuj fiŝkaptis la tutan nokton kaj nenion kaptis. Jesuo jam tion diris: “venos la nokto kiam neniuj plu povos agi”, kaj li eĉ diris: “sen mi vi nenion povos fari”.

Jesuo, estante nekonata, denove invitas ilin iri kaj fiŝkapti, kaj ĉifoje la fiŝkaptado estas abunda. Nu, dum ili eliras sur la teron ili trovas Jesuon – kaj nun jes ja ili rekonas lin ĉar Jesuo sin montras per la nura distingilo kiu rekonigas lin kaj liajn disĉiplojn, nome la servo. Li pretigis por ili panon kaj fiŝojn.

La evangeliisto tie uzas la samajn dirmanierojn, kiuj en la aliaj Evangelioj estas uzataj por indiki la eŭkaristion, nome la manĝaĵon kiu revigligas, ĝi revigligas la disĉiplojn post la laboro kiun ili faris kaj komunikas al ili novan forton.

Se tiel diri, kontraŭe la dua parto de tiu evangelipeco estas la kontreguligo inter Jesuo kaj Sankta Petro. “Kiam ili finis la manĝon”, do temas ne nur pri tagmanĝo, sed ĉi tie la evangeliisto bildigas la eŭkaristion. Kaj jen la efiko de la eŭkaristio, Jesuo sin turnas al Simon Petro kaj demandas al li: “Simon, filo de Jona”, filo signifas la disĉiplo ĉar ankaŭ Petro estis disĉiplo de Sankta Johano la Baptisto, “Ĉu vi amas min pli, ol tiuj?”.

Petro volas esti la gvidanto de la grupo kaj tiam Jesuo petas lin: “kiajn kvalifikaĵojn vi havas, kiajn akreditiletojn vi havas por esti ĉefo? Ĉu vi min amas pli ol ĉiuj aliaj? Kaj Petro respondas al li: “Jes Sinjoro”, tamen li ne respondas al la demando de Jesuo. Kiel verbo “ami” la evangeliisto uzis la grekan verbon agapao [ἀγαπάω] kiu signifas “senkondiĉa amo”, senpaga amo, kaj Petro ne povas respondi jese kaj li diras: “Jes Sinjoro vi tion scias...” kaj la evangeliisto por la respondo de Petro uzas la verbon “fileo” [φιλέω] kiu signifas “ami kiel amiko”.

Nu Jesuo akceptas kion la disĉiplo povas doni al Li kaj Li diras al li: “Paŝtu...”, nome, alportu nutraĵon, havigu herbon, manĝigu “miajn ŝafidojn”. En la ŝafaro la ŝafidoj ĉiam estas la pli malforta parto. Sed Jesuo revenas al la demando: “Li diris al li ankoraŭ la duan fojon: Simon, filo de Jona, ĉu vi min amas?”. Ĉifoje Jesuo evitas la komparon. Antaŭe li demandis: “ĉu vi amas min pli, ol tiuj?”, nun Li petas lin simple ĉu li Lin amas.

Kion respondas Petro? “Jes Sinjoro”, sed li ne povas respondi ke li amas lin senkondiĉe, “Vi scias, ke mi vin amas”. Nu Jesuo diras al li “Paŝtu”, nome, regu, prizorgu, tiu estas la signifo de la verbo, “miajn ŝafojn”. Antaŭe la ŝafidoj kaj poste la ŝafoj...

Jesuo diris al li la trian fojon: “Simon, filo de Jona, ĉu vi min amas?”- kaj la nombro tri agitas la kompatindan Petron ĉar ĝi rememoras al li la krion de la koko kaj lian malkonfesion - Du fojojn Jesuo demandis al li ĉu li amas Lin, kaj du fojojn Petro respondis al Li: “Mi vin amas”. Nun Jesuo la trian fojon demandas al li: “Ĉu vi amas min?”. Estas la unua fojo en tiu ĉi evangelipeco ke li aperas nur kun la kromnomo kiu indikas lian malcedemon kaj obstinon kaj li rememoras tion kio kondukis lin al perfido – “li ĉagreniĝis”.

Finfine! Tiu ĉagreno kiu ne ĉeestis en la momento de la perfido al Jesuo, nun ĝi aperas ĝuste ĉar la trian fojon rememoras al li la perfidon. “Kaj li diras: “Sinjoro vi scias ĉion”. Tiu disĉiplo kiu opiniis sin koni pli kaj pli bone ol lin konis Jesuo kiam li diris: “ĉi nokte vi ĉiuj lasos min sola” kaj Petro respondis: “eĉ se ĉiuj lasos vin sola mi tion ne faros”.

Do, finfine li scias ke Jesuo lin konas. “Sinjoro, vi scias ĉion; kaj vi scias, ke mi vin amas”. Jesuo responde diris al li: “Paŝtu miajn ŝafojn.”, li prenas la verbon de la unua respondo kaj la ŝafojn de la

lasta respondo por unuigi la tutan ŝafaron, do, elmontri ke oni amas Jesuon signifas havigi vivon, donaci vivon al la ŝafaro kaj oni donacas la vivon al la ŝafaro nur donacante sian vivon.

Jen kial Jesuo diras, ĉe la fino de tiu ĉi evangelipeco: “Vere, vere, mi diras al vi”, do temas pri tre grava elparolo, “Kiam vi estis juna, vi zonis vin, kaj iris, kien vi volis; sed kiam vi maljuniĝos, vi etendos viajn manojn, kaj alia vin zonos, kaj portos vin, kien vi ne volos”.

Jesuo klare estas aludanta la krucumadon. Kiam la krucumoto devas etendi siajn manojn sur la eŝafodo kiun li kondukas ĝis la loko de la krucumo, li estas ligita, zonita kaj oni alportos lin kien li ne volas, sed tiu ĉi morto, certigas Jesuo ne estos malvenko tiel kiel la Lia. La evangelipeco finiĝas tiel: “Tion li diris, montrante per aludo, per kia morto li gloros Dion”.

Do, kiam la amo manifestiĝas pere de la donaco de la vivo ĝi neniam estas malvenko sed glorado de Dio, kaj, finfine, la unuan fojon, nun kiam li ja scias kion signifas sekvi Jesuon, kaj ke tio ne signifas iri renkonten al gloro kaj al sukceso, Jesuo diras al li: “Sekvu min”. Tion kion Jesuo ne diris al li dum la unua renkontiĝo, nun, finfine tion Jesuo diras al li.

Sed ĉu Petro sekvos lin? Tion ni vidos en la daŭrigo de la evangelia komentario.